
APRILO 2016

La «Espéranto-Gironde» Informilo

N° 147



# Saeed AHMAD prezentis punĝaban sufismon




# en Universitato Bordeaux Montaigne

# MARTA STAĜO APUD LIMOĜO : NIN NUTRIS *LA LUTRO*

Inter dudek kvin kaj tridek partoprenantoj ĝoje retrovis sin en la naturrifuĝejo **La Lutro** apud Limoĝo dank'al energia impulso de Isabelle Jacob sabaton 12an kaj dimanĉon 13an de marto. Tri grupoj diversmaniere praktikis esperanton; jen la unua por veraj komencantoj ĉirkaŭ Isabelle; malkaŝita celo estis inici homojn, kiuj vizitos Rumanion kun Rodica en junio. Jen la dua por progresantoj animata de bedaŭrinde malsaneta Christian Lavarenne; kvankam li komence stresis pro tiu gvidantomisio, la bonhumuraj ĉeestantoj tre ŝatis liajn klerajn respondojn kaj diligente sekvis liajn instruojn. Kaj jen la tria sub la muziko de Pjer Buvje kaj FaMo, kiu rekantadis kelkajn kanzonojn el la repertuaro de La Kompanoj kaj aldonis *La Sudo*-n de Nino Ferrer plus *Sur la placo* (traduko de Janine!) kaj kromajn Brelaĵojn, kiujn FaMo solkantis sursceneje. Fabrice informis nin pri sia ĉijara projekto koncentriĝi por Brel-projekto kun Pjer kaj Bernard. Krome Marcelo kaptis la okazon de la naturprotekta loko por enŝovi malnovan lulkanzonon *La bufoj*.

Inter la elstaraj tempoj dum tiu semajnfino menciendas la kunkantado sub la alta volbo de la limoĝa stacidomo. Bedaŭrinde malmultaj pasantoj aŭdis nian entuziasmon animi la halegon dum kvardek kvin minutoj. Tamen pluraj informkalendaretoj estis disdonitaj.

Aliaj gravaj tempoj? Ni frandis bongustegajn tagmanĝojn preparitajn de Isabelle! Abunde servitaj! Fakte ĉiu grupano estis tre malferma, tial ĉu novbakita, ĉu muzikanta, ĉu kanzonmalkovranta, ĉu naturspecialista, ĉu tia aŭ maltia, ĉiu ajn senpere komunikis kun la aliaj. Ĉirkaŭ la tabloj sidis miksitaj anaroj. Limoĝanoj najbaris kun Mansanoj aŭ Ĝirondianoj kaj kuntrinkis en tre agrabla senstreĉa etoso!

*Marcelo*



# ESPERANTO GIRONDE
# KUNVENO EN MONTENDRE LA 20an de MARTO 2016

Ĉeestis: Elvezio Canonica, Janine Dumoulin, Yannick Dumoulin, Monique Dussenty, Marie-Thérèse Guillaume, Christiane Jagueneau, Michel Jagueneau, Pejo Labbé, Joël Lajus, Claudine Pomirol, Marcelo Redoulez, Micheline Sabron, Morine Stride, Bernard Vidal.



Elvezio raportas pri la kantostaĝo de la Kompanoj en Limoĝo, pasintan semajnfinon. Ĉeestis trideko da homoj, kaj la etoso estis tre bona.

Okazis lingvo-kurso far Christian Lavarenne.

FaMo kaj Pjer Buvje' prezentis novajn kantojn : *La Bufoj*, *Sur la Placo*.

FaMo kantis novajn Brelaĵojn, proponis kunkanti iujn el la Lilla spektaklo : *La Plata Lando*, *La Flandrinoj*, *Amsterdamo*.

Sabaton vespere, ĉiuj kunkantis en la stacidomo de Limoĝo dum tri kvaronhoroj. Isabelle disdonis kalendaretojn. La sono sub la tre alta volbo estis ege bela.

En Limoĝo alvenis nova lernanto: juna alĝeriano, studento en Limoĝa universitato, kiun gastigas Marie-Thérèse.

Elvezio raportas ankaŭ pri la Festo de la Lingvoj, kiu okazis ĵaŭdon la 17an de marto en la universitato Bordeaux Montaigne. Li deĵoris ĉe budo pri Esperanto kun Ĵan-Seb. Multaj studentoj haltis kaj informiĝis, pluraj donis sian retadreson. Tio estas interesa afero, ĉar venontjare du el la tri nunaj esperanto-lernantoj ne plu estos en la universitato.

Venontan ĵaudon, la 24-an, Saeed Ahmad, pakistana gasto, prelegos en la universitato Bordeaux Montaigne je la 17a kaj duono pri «Sufismo en Punĝabo». Li prelegos en esperanto, kun tuja traduko far Ĵan-Seb. La anonco aperis en la universitata paĝaro. La prelegon sekvos kunmanĝo en apuda restoracio.

Marcelo informas pri mesaĝo de Floreal (Vinilkosmo) por antaŭmendo de la venonta disko de JoMo. Post eta diskuto, estas decidite, ke Esperanto-Gironde antaŭmendos dek.

Janine raportas pri la koncerto de Morine en la preĝejo de Montendre, la 6an de februaro. Ĉeestis 70 personoj, kiuj  multe ŝatis la spektaklon. Vendiĝis kelkaj KDoj!

Claudine informas pri mesaĝo de Jean Ripoche kaj Stano Marĉek por proponi librojn kun rabatita prezo (Rekta metodo kun KD).

Morine insistas, por ke ĉiu respondu al la referendumo de SAT-Amikaro pri la estonto de la asocio.

Diskuto pri tiu referendumo: Se SAT-Amikaro kunfandiĝos en SAT, tio estos vera malfondo. La plejmulto de la lokaj asocioj de SAT (en Nederlando, Germanio ktp) ne plu funkcias. Plu viglas SAT-H (Hispanio) kaj tiu de Japanio.

Bernard Vidal opinias, ke internaciismo estas eksmoda ideo, kaj por Morine la vortoj en la statuto estas nenuntempaj, tiel ke oni ne plu povas antaŭeniri.

Joël opinias, ke estus pli klare por la francparolantoj, se SAT-Amikaro kunfandiĝus en UFE, sed Marcelo substrekas, ke temas pri du malsamaj aferoj, kies celoj malsimilas. En SAT aŭ SAT-Amikaro, ĉiu membro havas voĉon en voĉdonado kaj la plenumkomitato realigas tion, kion la membroj decidis dum la kongreso. UFE, male, estas federacio, en kiu centra estraro decidas pri la ontaj agadoj. Dum jaroj SAT kaj UEA havis sintenon de reciprokaj malamikoj, sed en la jaroj 1990aj, okazis pliproksimiĝo inter la internaciaj asocioj, kaj ankaŭ inter la francaj (ekzemple, en 2007, la Kompanoj prezentis spektaklon en Sète okaze de la UFE-kongreso). UEA evoluas al malfermiĝo; tion oni sentis dum la Lilla spektaklo, en kiu estis tri fortaj momentoj: la omaĝo al la turkaj ministoj, Lili kaj la omaĝo al la desegnistoj de Charlie.




Bernard dankas al ĉiuj, kiuj venis en Gujan-on por la centjariĝo de Pedro; tiu ĉi estis tre ĝoja, kaj ni preskaŭ plorigis lin; siaflanke Joël gratulas al Bernard pro la programo de tiu festo.

Post la manĝo, Marcelo disdonas kanzonojn, kiujn li eltiris de malnova libreto (pli-malpli el la jaroj 1940-aj), kiun li ĉerpis el sia subtegmenta trezorejo.




La libro estis printita en Arraso. Plurajn kantojn tradukis iu «Civitano»; kiu li estis?
Alia tradukinto estas nederlandano, kiu migris al Arraso en 1948.

Ni kune kantas du kantojn: *La Bufoj* kaj *Renkonte al la vivo*.
*La Bufoj* estis verkita far Victor Meusy, unu el la ĉefrolantoj de la kabaredo La Nigra Kato. Tiu kanto estis famigita okaze de junularaj renkontoj.

*Janine*

# MONTENDRE invitas vin!

Okaze de sia **20a** datreveno **Montendre Esperanto Grupo** invitas vin partopreni en la **jubilea festo**, kiu okazos **dimanĉon, la 3an de julio** en la **Kultura Centro de Montendre** ekde la 10a 30.



Bonvolu anonci vian partoprenon ĝis la 20a de junio, por faciligi la organizon. Antaŭdankon!

Telefone: 05 46 49 45 18
Retmesaĝe: janinedum@neuf.fr

## Esperanto en la bordoza universitato!

Kadre de prelegvojaĝo aranĝita de Yves Nicolas, vizitis nin el Pakistano Saeed AHMAD .

Kvankam lastminute enprogramite la 24an de marto je la 17a kaj 30, Elvezio sukcesis enŝovi prelegon pri sufismo en klasĉambro de la bordoza universitato. Dudeko da ĉeestantoj, gestudentoj (inter kiuj tri novbakitaj Esperanto-lernantinoj), fakprofesoroj kaj esperantistoj sekvis la prezentadon de Saeed Ahmad, eminenta faka verkisto. Liajn parolojn en esperanto lerte tradukis Ĵanseb. Vera defia tasko rilate la temon. Gratulojn al ambaŭ!

Dankojn al Elvezio pro lia klopodo!

Fine pluraj el ni kune vespermanĝis en loka restoracio. Nia vegetarana kaj senalkoholema gasto sate manĝis kaj trinkis! Ĝojas la animoj! Rigardu kiel bela estas la mondo, malfermu viajn korojn al novrenkontoj!


*Marcelo*




El la retejo de Universitato Bordeaux Montaigne




Ĵan-Seb, Elvezio, Saeed




Afiŝo por la prelego
en la universitato

## PRELEGO DE SAEED AHMAD
## EN UNIVERSITAO BORDEAUX MONTAIGNE
## LA 24an de MARTO 2016 je la 17a 30

Saeed Ahmad venis en Bordozon okaze de turneo tra Francio. Lin gastigis Elvezio, kiu okazigis la prelegon de Saeed pri «Sufismo en Punĝabo» sine de la universitato. Ĉeestis dudeko da aŭskultantoj kaj Ĵan-Seb tradukis.



Jen kelkaj notoj el la prelego.

**Geografio**

La paŝtuna etno loĝas ambaŭflanke de la landlimo kun Afganistano. Pakistano estas islama lando (sunaistoj[1]). La ŝtato havas bonajn rilatojn kun Ĉinio: la Ĉinoj konstruis 11 800-kilometran vojon de la nordo al la sudo de Pakistano, kaj tio kostis 40 miliardojn da dolaroj.

Kaŝmiro estas problemo inter Pakistano kaj Hinda Unio. La landlimo inter la du ŝtatoj «buĉis» Punĝabon en du partojn.

Aliaj provincoj estas Baloĉistano, Sindho (kies ĉerfurbo estas Karaŝi, kun 25 milionoj da enloĝantoj). Karaŝi antaŭe estis ĉefurbo de Pakistano, nun la ĉefurbo estas Islamabado. «Sindho» estas la pakistana nomo de rivero Induso.

La nomo «Punĝabo» signifas «kvin riveroj». En la norda parto de la regiono troviĝas la fonto de Induso. Estas tri montaroj en la nordo de la lando: «la tegmento de la mondo». Dekunu el la ĉefaj pintoj de tiuj montaroj staras en Pakistano.

1– sunaistoj = *sunnites*

La du ĉefaj riveroj estas Induso kaj Ganĝo. La elfluejoj de ambaŭ estas en Pakistano. Laŭlonge de ĉiu rivero disvolviĝis du malsamaj civilizoj: 1500 kilometroj disigas la elfluejon de Induso disde tiu de Ganĝo.

Pakistano entenas ĉirkaŭ 200 milionojn da enloĝantoj.

Saeed havas naŭ gefratojn, kaj lia avo havis dek tri gefilojn.

Pakistano estas malriĉa lando pro tio, ke ŝtatestroj estas ŝtelistoj. Naŭdek pro cento de la mono iras al eŭropaj bankoj. La sama problemo kuŝas en Hindio.

Ne estas pura akvo, kio kaŭzas malsanojn, sed ne estas malsanulejoj.




**Lingvoj**

La punĝaba lingvo estas parolata de 48% el la loĝantaro sed la urdua lingvo estas la oficiala, kaj la ŝtato celas mortigi la aliajn lingvojn. Urduan lingvon Saeed konsideras kiel la «lingvon de la sklavoj», ĉar la urduoj rapide kunlaboris kun la britoj en la tempo de la kolonizado.

Saeed verkis libron en la punĝaba kaj angla pri la punĝaba kulturo, kaj alian en esperanto pri la majstroj de sufia saĝo. Tiu lasta ekzistas ankaŭ en la franca.

**Festoj**

La ĉefaj festoj en Pakistano estas la Granda Eido, la Malgranda Eido kaj la Sendependa Tago. La tago de tiuj festoj ŝanĝiĝas ĉiujare laŭ la luna kalendaro.

**Edukadaj sistemoj**

1/ Privata, modernisma, tute en la angla, por la riĉuloj
2/ Registara ordinara, en la urdua
3/ Religia edukado, kune kun la ordinara (en la urdua kaj en la araba)
4/ Tute religia sen ordinara edukado, en ĉiu granda moskeo (en la urdua kaj la araba)

Antaŭe estis multaj buddaj preĝejoj en la norda parto de Pakistano, sed nun ili iom post iom malaperas.

**Ekonomio**

En Baloĉistano estas grandaj minejoj de gaso, petrolo kaj en Kaŝmiro oni trovas rubenojn. Ekzistas ankaŭ tre granda sal-minejo 300-kilometrojn longa.






Rubenoj el Baloĉistano

**Kulturo**

La tre granda moskeo de Lahoro (*Reĝa Moskeo*) el la 17a jarcento povas akcepti 10 000 fidelulojn en la ĉefa ĉambro, kaj pli ol 100 000 en la korto. Sed nun ekzistas tri aliaj pli grandaj, konstruitaj de riĉuloj.



La Reĝa Moskeo en Lahoro

En Punĝabo la ĉefaj bestoj estas bovinoj. Kuraĝaj virinoj melkas bovinojn du fojojn tage, kaj tio estas ege peniga laboro. Estas fama rakonto pri eta maldika maljunulino, kiu posedis dek ok bovinojn kaj unu ĉevalinon. Iun nokton, granda dikmuskola ŝtelisto envenis por forŝteli la ĉevalinon. La maljunulino, vekiĝinte pro la bruo, provokis la ŝteliston en duopa forto-batalo: se li venkos, li povos forpreni la ĉevalinon... Kaj la ŝtelisto reiris sen ĉevalino sed kun rompita brako...




La diversaj kulturoj de Pakistano

Bedaŭrinde nun arabismo iom post iom mortigas tiujn praajn kulturojn.

Islamo entenas tri sektojn: ŭahabistoj[2], ŝijaistoj[3] kaj sunaistoj.

**Ŝtataj fortoj**

Pakistano estas unu el la ok ŝtatoj kun nukleaj armiloj, kaj ĝia armeo estas une el la plej fortaj en la mondo.

**Manĝaĵoj**

El la lakto oni faras jogurton kaj buteron.




En la regionoj Punĝabo kaj Sindho la homoj estas vegetaranoj. Male araboj ŝatas viandon. Manĝi viandon igas la homojn agresemaj.

En la punĝaba lingvo «ro ti» estas bakita pano, kiu estas vendata ĉie sur la stratoj. Punĝabo produktas ankaŭ sukerkanojn kaj multajn tre dolĉajn fruktojn .

**Spirita vivo**

Punĝaba kulturo estas sufia saĝo.

El polvo, aero, fajro, akvo, Dio knedis unu grandan pilkon, el kiu li faris etajn pilkojn.

Diverskoloraj kolomboj naskiĝis ĉie en la mondo el paro unukolora. Bildo montras plurajn el diversaj koloroj, sidantajn kune sen zorgo pri la koloro: ili simbolas la unuecon de la tuta homaro. Same, diverskoloraj gemoj venas de la sama montaro.




Ĝis 1947, ĉiuj religioj kunvivis. Hodiaŭ nur islamo venkas. Ĉiu homa grupo agas por si mem. Kiam estas amo, la «rivero de amo» fluas; kiam ne estas amo, ĝi sekiĝas. Kiam guto falas en la riveron, ĝi malaperas kaj iĝas la rivero mem. Guto aparta estas Satano. Ni ĉiam devas esti parto de la homaro. «Alaho estas bela kaj amas belecon».

Raporto de *Janine*

2 - ŭahabistoj = *wahhabites*

3 - ŝijaistoj = *chiites*



Kelkaj libroj, kiujn verkis Saeed



Ĵan-Seb, zorge aŭskultanta




La tuta ĉeestintaro

## LA KOMPANOJ: ĈU EN CHATILLON SUR INDRE?

De la 13a ĝis la 16a de julio 2016 okazos la eŭropaj renkontiĝoj en **Châtillon sur Indre**, urbeto de 2700 loĝantoj situanta 45 kilometrojn norde de Chateauroux sur la vojo al Tours.



Jam de 6 jaroj, por estigi amikecon inter popoloj, la urbo gastigas ĉirkaŭ sia kastelo okaze de la 14-de-julia semajnfino pli ol 200 junuloj el 18 eŭropaj landoj. Tiuj renkontiĝoj estas organizitaj, sabate, ĉirkaŭ eŭropa bazaro kun spektakloj de dancoj, muzikoj, kantoj, ludoj... Lingvoj kompreneble estas grava temo dum tiuj renkontiĝoj.

Mi pensis, ke Esperanto povas havi sian lokon tie, kaj do sugestis, ke nia asocio "Espéranto Indre" havu budon. Mi ankaŭ imagis, ke Esperanto povos okupi eĉ pli grandan lokon sur la scenejo aŭ sur la strato, se ni povos kunigi kelkajn membrojn de la Kompanoj dum tiu semajnfino de la 14a de julio.

La organizantoj entuziasme akceptis nian partoprenon, ni do disponos pri salono por provkanti kaj pri budo en la t.n. «eŭropa vilaĝo». Ĉeestos delegacioj el Belgio, Britio, Bulgario, Ĉeĥio, Francio, Germanio, Grekio, Hispanio, Hungario, Italio, Latvio, Nederlando, Pollando, Portugalio, Rumanio, Ruslando, Slovakio kaj Slovenio.

Estos pluraj okazoj por ni kunkanti :
La 13an vespere okazos torĉa marŝo, dum kiu ni povos kanti marŝante.
La 14an matene ni povos paradmarŝi inter la landaj delegacioj kaj unu delegito rajtos diri kelkajn vortojn dum la oficiala ceremonio.
La 14an vespere dum la vespermanĝo eblos kunkanti.
La 15an je la 10a, en Loches, okazos prelego pri Eŭropa Unio kaj ties fundamentaj rajtoj. Eblos kunkanti surloke.

El retmesaĝo de Nicole BLOT (n.blot36@laposte.net)
Vicprezidantino de associo Espéranto Indre
06 12 91 92 42

# STAĜOJ

**Junio 12a-17a:** La Luaro laŭ la vortoj, verkistoj kaj kasteloj
**Julio 4a-15a:** Dektaga kurso pri la esprimo de la tempo en Esperanto ... kaj pli
**Aŭgusto 6a-13a:** SOMERAS, la Esperanto-studad-semajno
**Aŭgusto 21a-28a:** Festa semajno por infanoj kaj familioj

**M.C.E. Château de Grésillon, St. Martin d'Arcé 49150 BAUGÉ-EN-ANJOU**
Tel.: 02 41 89 10 34 (aŭ 09 51 64 10 34) - Informoj: gresillon.org

**Junio 20a-24a: Promeni tra naturo kaj Vikipedio (Alain Favre)**
Tiu staĝo havos du aspektojn: Ni promenos en naturo kaj malkovros speciojn de vivuloj; ni verkos artikolojn por Vikipedio pri la sama temo.
Tiu staĝo taŭgas ankaŭ por prepariĝi al la faka branĉo "Sciencoj kaj Tekniko" de la **Atesto pri Kapableco** de FEI.

**KVINPETALO Esperanto-Centro, 4 rue du Bureau 86410 BOURESSE**
Tel.: 05 49 03 43 14 (aŭ 06 07 31 67 81) - Informoj: kvinpetalo.org

## NIAJ KURSOJ

- A **GUJAN-MESTRAS**, le jeudi de 15h à 17h, cours pour débutants, au-dessus du centre St Exupéry, face à la gare SNCF. (06 95 02 85 00)

- A **CREON**, le jeudi tous les 15 jours de 14h à 16h, cours pour débutants chez Morine STRIDE, 17 rue Voltaire. (06 10 07 08 58)

- En **GALGON**, ĉiun mardon de la 17a ĝis la 19a, Joël LAJUS gvidas kurson por komencantoj kaj progresantoj. (05 57 69 26 96)

- En **CENON** (Kastelo Palmer), ĉiun lundon inter la 14a kaj la 17a, Marcelo REDOULEZ animas tradukgrupon kaj Claudine POMIROL kurson por komencantoj. (05 56 21 38 64)

- En **MONTENDRE**, ĉiun mardon de la 10a ĝis la 12a, Janine Dumoulin gvidas kurson por ĉiuj niveloj. (05 46 49 45 18)

- En **UNIVERSITATO BORDEAUX MONTAIGNE**, en salono B111, ĉiun merkredon de la 17a30 ĝis la 19a, kursojn gvidas Elvezio kaj Jean-Seb. (06 72 17 22 97)




**<u>Kiel Bertono Le Maire estis trompita de Renardo, kaj kiel Renardo estis trompita de Nigreto.</u>**

Mi fidas vin, diras al li Renardo. Mi scias ke vi famas pro via prudento. Tiam li liberigas Bertonon kaj la unuaj agoj de Le Maire estas ĵeti sin ĉe la genuoj de Renardo, priverŝi ties hararon per larmoj, etendi la liberigitan manon al la plej najbara monaĥejo, eldirante la omaĝan ĵuron laŭkutime.



- Nun, diras Renardo, kaj antaŭ ĉio liberigu min el via abomena reto.

La nenobelo obeas. Renardo estas denove libera.

- Ĉar de nun vi devige agu laŭ  mia volo, mi tuj provos vin. Vi konas tiun belan Nigreton, kiun mi gvatis la tutan tagon. Vi nepre lin alportu al mi; jen la prezo por mia amikeco al vi kaj liberigo el la omaĝo kiun vi eldiris.

- Ha, moŝto, respondis Bertono, kial vi ne postulas ion pli valoran? Mia koko estas malmola kaj nervoplena. Li estas pli ol du jara. Mi proponas al vi, interŝange, tri molajn kokidojn kies karno kaj ostoj tutcerte estos pli indaj je vi.

- Ne, kara amiko, diras Renardo,  mi fajfas pri viaj kokidoj. Konservu ilin kaj alportu la kokon al mi.

La nenobelo ĝemas, ne respondas, forpaŝas, kuras al Nigreto, ĉasas lin, atingas lin kaj, portante lin antaŭ Renardon diras:



- Sinjoro, jen tiu Nigreto kiun vi deziras. Sed, per Sankta Mandezo mi plibonvole donus al vi miajn du plej bonajn kaponojn. Mi tre amis Nigreton. Neniam estis koko pli klopodema, pli vigle atenta je miaj kokinoj; kompense li estis intense amata. Sed vi volis lin, mi donacas lin al vi.

- Bone, Bertono, mi estas kontenta, kaj por tion provi mi kvitigas vin je via omaĝo.

- Dankegon, mastro Renardo, kompensu al vi Dio kaj Sinjorino Sankta Maria.

Bertono malproksimiĝas, kaj Renardo tenante Nigreton inter siaj dentoj sindirektas al Maupertuis, ĝoja pro la penso ke li povos baldaŭ dividi kun sia amatino la karnon kaj la ostojn de la kompatinda besto. Sed li ne scias, kio okazos al li. Pasante sub volbo, kiu transpasis la padon al alia vilaĝo, li aŭdas la kokon ĝemi kaj plendi. Renardo sufiĉe kompatema ĉi-tage tutsimple demandas lin, kial li tiom ploras.

- Tion vi ja scias, diras la koko, malbenita la horo kiam mi naskiĝis. Ĉu mi estu tiel pagita pro la servoj ĉe tiu Bertono, la plej sendanka el la nenobeloj!

- Pri tio, diras Renardo, vi malpravas, kaj vi devus elmontri pli da kuraĝo. Iom aŭskultu min, mia kara Nigreto, Ĉu la senjoro rajtas disponi pri sia servutulo? Jes, ĉu ne? Same vere kiel mi estas kristano, mastro ordonas, servutulo obeas. Servutulo devas oferi sia vivon por sia mastro. Eĉ pli, li ne povas deziri pli bonan, pli belan morton.

*(Daŭrigota)*



*Desegnis Morin'*

# ESTRARO
# de
# « ESPÉRANTO-GIRONDE »

* * * * * * * *

**Centre Culturel  Château Palmer**
**33150 CENON**
**Banque Postale:**
**347771 F Bordeaux**

* * * * * * * * *

<u>Prezidanto</u>:  **Elvezio CANONICA**
Rés. Du Prince Noir Bât.D Appt.315
Avenue Sainte-Marie
33400 TALENCE
Tel: 06 72 17 22 97 / canonica.elvezio@orange.fr

<u>Sekretariino</u>: **Janine DUMOULIN**
2, chemin des Nauves
Chardes  17130 MONTENDRE
Tel: 05 46 49 45 18 / janinedum@neuf.fr

<u>Help-sekretariino</u>: **Morine STRIDE**

<u>Kasistino</u>: **Monique DUSSENTY**
76 avenue La Fontaine
33560 CARBON BLANC
Tel: 05 56 06 74 49 /  monique.duss@free.fr

* * * * * * *

Materialon por LEGI bv. sendi al janinedum@neuf.fr
aŭ al Yannick DUMOULIN: yannickdum@free.fr